

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 5, n-ro 1 (25): majo-junio 2012
Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde la 13-a.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

La krizo daŭras... La ŝuldoj de la okcidentaj ŝtatoj estas imensaj. Post kvindek jaroj da mal-saĝa buĝetpolitiko, la politikistoj, kiuj senzorge stakigis ŝuldojn en la nomo de demokratio, estas konfrontataj kun la sekvo de ilia farado.

Ĉu vere ekzistas demokratio, ekzemple en Belgio? Unu el ĝiaj principoj estas la disiĝo de la povoj: ekzekutiva povo, leĝdona povo kaj jurisdikcia povo. Tiu disiĝo ne plu ekzistas.

Kiam tiu principo estis unufoje aplikata, ne ekzistis partioj. La popolo elektis deputitojn por aprobi la leĝojn kaj kontroli la registaron. Nuntempe la elektitoj reprezentas la partiojn, kiuj kontrolas la parlamenton kaj punas la reprezentantojn de la popolo, se ili ne obeas la gvidanto(j)n de sia partio. Ili ne plu povas voĉdoni laŭ sia propra konvinko.

Alia principo estas, ke la plimulto regas la landon. Sed la registaro ne nur regas, sed ankaŭ faras la leĝojn. Aprobo far la parlamento estas nur formalaĵo. Al kio servas nun parlamento, se la deputitoj ne estas liberaj voĉdoni laŭ sia konvinko? La parlamento, kiu devus esti la plej alta politika povo en la lando, tiel fariĝis neutila, multekosta babilbarako. Anstataŭ la diktaturo de absolutista reĝo, ni havas nun la diktaturon de absolutista plimulto. Tiu sistemo ne estas pli bona ol tiu de la malnova reĝimo.

Mi tamen deziras al vi agrablan legadon.

Pieter Jan Doumen

Dua Libro de l' Lingvo Internacia (6) *(Tweede Boek van de Interntaionale Taal)* (6)

Se ia vorto ne estas trovata en la vortaro, kiun mi eldonis, kaj oni ĝin ne povas fari mem laŭ la reguloj de la internacia vortfarado, nek anstataŭigi per alia esprimo, tiam ĉiu povas krei tiun vorton laŭ sia persona plaĉo; tiel ankaŭ, se naskiĝus ia demando stilistika aŭ eĉ

gramatika, ne decidita klare en mia unua broŝuro, ĉiu povas ĝin decidi laŭ sia juĝo; kaj se vi volas scii, ĉu vi bone decidis tiun demandon, turnu vin ne al mi, sed rigardu, kiel decidas tiun demandon la plejmulto de la verkantoj. Ĉiu vorto, ĉiu formo, kie ne estas rekte kontraŭ la jam kreita gramatiko kaj vortaro, aŭ kontraŭ la logiko aŭ la leĝoj enkondukitaj de la plejmulto de l'uzantoj, estas tute bona, tute egale ĉu ĝi plaĉos al mi persone aŭ ne.



L.L. Zamenhof kiel gimnaziano en 1873
(starante malantaŭe kontraŭ la florvazo)

La verkoj, kiujn mi eldonos persone, ne devas havi pli da kompetenteco, ol la verkoj de ĉiu alia. Kaj poste, kiam la lingvo sufiĉe fortiĝos kaj ĝia literaturo sufiĉe vastiĝos, tiam ankaŭ tio, kio estas en mia unua broŝuro, devos perdi ĉian signifon, kaj sole kompetentaj tiam devos esti la leĝoj ellaboritaj de la plejmulto. Per unu vorto, la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaboritaj ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj vortaro, kiujn mi prezentis, devas esti sole la fundamento, sur kiu estos ellaborata la efektiva lingvo internacia de l'estonteco.

Se mi senigas min nun je ĉiaj personoj privilegioj, kaj fordonas ilin tute al la publiko, mi tion faros ne pro malvera modesteco, sed ĉar mi havas la profundan kredon, ke tion postulas la intereso de la afero, kiu alie ne povus regule kaj rapide vastiĝi kaj ĉiam estus en dependo de

unu persono kaj liaj eraroj. Nur viva konkursa laboro, ĉe kiu ĉio pli bona iom post iom elpuŝas la malpli bonan, povas doni efektive bonan kaj vivpovan lingvon internacian.

Multaj kredeble timos, ke danke tiun vastan liberecon la lingvo internacia baldaŭ disfalos en multaj malsamaj lingvoj. Sed kiu konas iom la historion de la lingvoj, tiu komprenos, ke tiu timo estas tute senfonda, ĉar ni ĉiuj laboros sur unu fundamento, kaj tiu fundamento, enhavante la tutan gramatikon kaj la pli grandan parton de l' vortoj, kiuj en la parolado estas renkontataj la plej ofte, havos en la lingvo internacia tiun saman signifon, kiun en ĉiu lingvo havis tiu lingva materialo, kiu estis en ĝi en la komenco de regule skriba literaturo: estis preta gramatiko, estis granda kolekto da vortoj, sed multaj vortoj ankoraŭ malestis. Tiuj ĉi vortoj estis kreataj unu post unu, laŭ la kreskanta bezono, kaj malgraŭ ke ili estis kreataj de malsamaj personoj, sen ia kondukanto aŭ leĝodonanto, la lingvo ne sole ne disdividiĝis, sed kontraŭe ĝi ĉiam pli unuformiĝis, la dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis antaŭ la fortiĝanta komuna literaturo lingvo. Ke mia unua broŝuro prezentas fundamenton sufiĉe fortan, kaj ke la fundamenta vortaro enhavas nombron da vortoj sufiĉan kaj tiel grandan, ke se oni volas, oni povas eĉ tute libere esprimi siajn pensojn sen kreado de novaj vortoj, montras la fakto, ke en la tuta "Dua Libro" vi ne renkontas eĉ unu nove kreitan vorton! (Vi renkontos tie, vere, multajn vortojn, kiujn vi ne trovas en la fundamenta vortaro, sed tio ĉi estas vortoj ne nove kreitaj, sed nur tiaj, kiujn mi danke la gramatikon (C.7.) ne bezonis presi en la vortaro). Oni devas memori, ke ĉiu lingvo servas por esprimi siajn pensojn, sed ne por senpense traduki el aliaj lingvoj; oni devas tial peni esprimadi siajn pensojn per la jam estantaj vortoj kaj krei do novajn vortojn nur tie, kie ĝi estas efektive necesa, kaj tiam la vortoj nove kreataj estos nur malofte disĵetitaj inter la multo da vortoj jam konataj kaj povos facile aliĝi al la lingvo kaj riĉigi ĝin, ne perdigante ĝian unuformecon.

Tiel, danke la unu gramatikon kaj la unu formon de la plej granda parto de l' vortoj, la lingvo internacia havos jam de l' komenco unu formon ĉe ĉiuj uzantaj ĝin. Nur tiuj vortoj kiuj en la fundamenta vortaro ne estas trovataj, en la unua tempo estos malegale kreataj de malsamaj aŭtoroj. Sed ĉar unue tiaj vortoj estos renkontataj nur disĵetite inter la multo da vortoj jam konstantaj, kaj due la nombro de tiaj mal-

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

hechtel@kbc.be

egale sonantaj vortoj ankoraŭ pli malgrandiĝos danke la komunan fonton, el kiu la aŭtoroj prenadus la novajn vortojn (la plej gravaj eŭropaj lingvoj), tial tiuj "novaj" vortoj prezentos nenion alian ol provincialismojn de la unu lingvo internacia. Tiaj provincialismoj estis en granda nombro en ĉia alia lingvo, kaj kun la disvastiĝado de la skribita literaturo ili komencis perdiĝi. Tio sama estos ankaŭ en la lingvo internacia, sed ĉar la lingvo internacia pli dependas de la volo de l' homo, ol de aliaj kondiĉoj, tiu procedo de unuformiĝado iros en ĝi multe pli rapide. La vortoj malfeliĉe kreitaj baldaŭ perdiĝos, kaj la vortoj feliĉe kreitaj restos kaj eniros en la lingvon; la vortoj feliĉe kreitaj, sed malegale sonantaj, kelkan tempon batalos inter si kiel sinonimoj, sed jam post mallonga tempo ni vidos, ke unu el tiuj formoj estas uzata pli ofte kaj de la pli granda parto de la verkantoj, ol ĉiuj aliaj formoj, – kaj baldaŭ la unua formo elpuŝos ĉiujn ceterajn formojn, kiuj post kelka tempo simple mortos de neuzado. Tiel ju pli energie vastiĝos kaj riĉiĝos la literaturo de la lingvo internacia, des pli baldaŭ ni havos unuforman pli plenan vortaron.

Tiuj, kiuj volas labori super la lingvo internacia, skribi verkojn en tiu lingvo etc., povas nun diri kuraĝe, ke ili havas en la manoj plenan vortaron, ĉar povante krei ĉian ankoraŭ ne kreitan vorton laŭ sia plaĉo, anstataŭ atendi, ĝis mi ĝin kreos, ili povas nun esprimi en la lingvo internacia ĉion, kion ili deziras. Tio ĉi estus ne ebla en la okazo, ke mi volus mem eldoni plenajn vortarojn: ĉar kiom ajn mi laborus, ĉiam danke la senfinecon de la homa vortaro, restus ankoraŭ multe da vortoj nekreataj, kaj tiuj, kiuj devus ilin uzi, ne sciis kion fari, ĉar krei ilin al ili mem estus ne permesite.

(D-ro L.L. Zamenhof, daŭrigota)

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Francio – *Kontraŭ la unika penso* –

La konata lingvisto kaj poligloto, Claude Hagège, posedanto de la Ora Medalo de la Nacia Centro pri Scienca Esplorado 1995 kaj honora profesoro en la Kolegio de Francio, estis invitita de ĵurnalisto Axel de Tarlé vendredon la 10-an de februaro 2012 ĉe la televida kanalo France 5.

La motivo de la intervjuo pri la temo “Lernado de fremdaj lingvoj” estis samtempe ligita al la projekto de la ministro pri Nacia Edukado, Luc Chatel, pri la instruado de lingvoj, sed kiu havigas ekscesan ĉefecon al la nura angla, kaj al la freŝdata apero de la verko “Contre la pensée unique” (Kontraŭ la unika penso), en kiu Claude Hagège kondamnas la nuranglalingvan politikon kaj alvokas al ekkonsciiĝo, al releviĝo. La diskutado estis sufiĉe vigla. Claude Hagège kontraŭbatalas la antaŭjuĝojn, laŭ kiuj la angla estas “facila lingvo”, kaj la akuzon esti malŝatanto de la angla. Pasiiginta pri lingvoj, li malŝatas neniun, sed li prave forĵetas la uzon de ia ajn lingvo kiel ilo de mensmanipulado kaj superrego. La lasta demando de Axel de Tarlé koncernis Esperanton kiel eventualan alternativon. Per tono digna kaj firma Claude Hagège agnoskis, ke Esperanto meritas prikonsideron pro tio ke ĝi estas lingvo malantaŭ kiu troviĝas nek regpovo, nek celado al superrego.

(Henri Masson, Francio)

Slovenio – *Esperantisto ministro en Slovenio* –

La nova registaro de Slovenio, kiu ekfunkciis en februaro, havas nur 12 ministrojn, inter kiuj Ljudmila Novak, kiu ne havas propran administracion, sed estas ministrino pri “slovenanoj eksterlande”. Ŝi estas prezidantino de la kristan-demokrata partio de Slovenio.



Ljudmila Novak lernis Esperanton en sia jun-aĝo. En 2007 ŝi partoprenis en la kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio en Slovenio. Antaŭ ol eniri politikon Ljudmila Novak instruis la slovenan kaj la germanan kaj laboris en centro por handikapuloj en Kamni. Ŝi eniris la municipan konsilantaron de Moravče kaj eĉ fariĝis ĝia urbestro. En 2004 ŝi fariĝis deputitino en la Eŭropa Parlamento. Ŝi estis unu el la du eŭrop-uniaj deputitinoj, kiuj parolis Esperante. La alia estis Malgorzata Handzlik el Pollando. Post tio ŝi fariĝis deputitino en Slovenio.

Ŝi tamen ne plu aktive uzas la lingvon. Inter esperantistoj ŝi konatiĝis komence de 2009, kiam en la komitato pri kulturo en la Eŭropa Parlamento ŝi prezentis siajn ŝanĝoproponojn al raporto pri multlingveco. En sia teksto ŝi konstatis, ke la principo de lingva egaleco ne povas esti observata per uzo de nacia lingvo kiel komuna lingvo. Tial ŝi proponis, ke EU pristudu la eblecon kaj utilecon de artefarita neŭtrala lingvo, ekzemple de Esperanto.

En intervjuo kun Libera Folio ŝi tiam konstatis, ke la principa multlingveco de la EU efektive kondukas al la superregado de kelkaj lingvoj. Esperanto povus esti, flanke de la naciaj lingvoj, komuna lingvo por komunikado inter ŝtatanoj de diversaj nacioj, speciale ĉar ĝi estas relative facila, tiel ke ankaŭ lingve malpli talentaj civitanoj povus rapide lerni ĝin.

(Libera Folio)

Brazilo – *Post Ĝangalo... nun Nunonia* –


Laŭ informo de Ret-Info, trovebla sur la *facebook* de Kandido Ruis [Cândido Ruiz], **Nunonia** estas ‘esperantlingva portalo, kiu baldaŭ publikigos ĉiutagajn mondajn novaĵojn, kaj ankaŭ disponigos plurajn aliajn servojn: blogaron, babilejon, forumon kaj multajn aliajn aferojn. Nunonia estas ‘nia nuno’.

Kandido estos ĝia ĉefredaktoro kaj administranto, kaj Flavio Ribelo, kiu estris la portalon Ĝangalo antaŭ kvin jaroj, kunlaboros kun li. Ili intencas fari pli bone ol Ĝangalo, kiu jam estis bona tiutempe, sed la teknikaj rimedoj multe pliboniĝis intertempe. La portalo ekfunkciis la 24-an de februaro. Nunonia estas kontaktebla per la adreso redakcio@nunonia.com por proponoj pri informado kaj kunlaboro.

(Ret-Info, Hungario)

Usono 1 – *Google tradukas en Esperanton* –

En marto Google inkluzivigis Esperanton en sia traduksistemo. Nun la revo fine realiĝis! Tio devus esti la unua reklamfakto en la



venontaj monatoj, kvazaŭ donaco por la 125-jara jubileo de Esperanto. La grandega reklama atingo por Esperanto estas, ke la plej granda, prestiĝa kaj vaste konata tradukplatformo en la mondo inkluzivigis Esperanton en tiu ekskluziva klubo de 64 lingvoj. Tiu-ĉi fakto ne povas manki en iu ajn reklama aŭ informa teksto pri Esperanto. Kompreneble, la kvalito de la tradukado ne estas tre alta, aparte al certaj lingvoj, ekz. la rusa, kiel notas Aleksandro Korĵenkov, kaj ankaŭ al la hebrea, kiel mi rimarkis uzante ĝin por traduki hebrean la subtitolojn de alia reklama trezoro, *La Universala Lingvo* de Sam Green, sed tio estas la problemo de ĉiuj aŭtomataj tradukiloj. Oni devas korekti ilin per la laboro de homa tradukisto, kiu bone regas la cellingvon. La granda avantaĝo de aŭtomata tradukado estas, ke ĝi provizas la bazan tekston kaj tiel ŝparigas multan laboron.

(Armi Wandel, Israelo)

Usono 2 – La multaj vivoj de D-ro Esperanto –

Profesoro pri la angla en la universitato Princeton en la usona ŝtato Nov-Jerzejo, Esther Schor respondis al demandoj de la reĝisoro Sam Green, aŭtoro de la dokumentaj filmoj *The Weather Underground*, *Utopia in Four Movements* kaj *The Universal Language*. Ŝi nun finpretigas libron pri D-ro Zamenhof. Same kiel Sam Green, kaj kontraŭe al multaj francaj intelektuloj aŭ politikistoj sub influo de ĉiaj mitoj, kiuj esprimas opinion, surbaze de antaŭjuĝoj kaj onidiroj, ŝi esploris la mondon de Esperanto por havi ĝustan opinion pri ĝi.

Ŝi diris: “Mia verko alternas inter historiaj faktoj kaj rakontoj de Esperantistoj, kiujn mi renkontis en inter alie Hanojo, San Diego, Brazilo, Pollando kaj Turkio. Nun mi havas la malneton de la tuta libro, krom unu aŭ du

pecetoj. Necesis sufiĉe da tempo por decidi, kiel organizi ĉi tiun libron, ĉar mi volis verki duoblan libron: mi volis skribi kaj pri mia persona sperto kaj verki rigoran kaj akademian dokumentitan historion. La problemo estis ekscii, kiel ĉi tiuj du fazoj de Esperanto – nuntempo kaj pasinteco – interrilatas, kaj mi pensas, ke mi sukcesis. La sekvanta paŝo estos glatigi ĝin, por ke ĝi ŝajnu kvazaŭ senjunta tuto, kiun mi verkis dum unu posttagmezo.”

La plej interesa sperto de Esther Schor estis vizito al *Bona Espero* en Brazilo. Esther Schor kuraĝas diri: “Mi amas Esperanton. Mi amas paroli pri ĝi.” Eblas aŭskulti ŝin en la angla per registraĵoj troveblaj sur la retejo de Esperanto en la Universitato de Rochester. Elŝutu MP3-dosieron aŭ aŭskultu ŝin per iTunes.

(Henri Masson, Francio)


Hungario 1 – Filmo en Reta Kinejo de UEA –

En la Reta Kinejo de UEA eblas nun vidi la filmon “Vojaĝo al Marsejlo”. La 45-minuta filmo temas pri la partopreno de la germana esperantistino Injo en la 42-a UK de Marsejlo en 1957, sed ĝi enhavas ankaŭ 10-minutan parton pri la 41-a UK en Kopenhago en 1956, interalie kun bildoj el la unua infana kongreseto. En la filmo aperas multaj famaj esperantistoj kaj oni aŭdas fragmentetojn el paroladoj de Giorgio Canuto kaj Ivo Lapenna.

La filmo estis farita per modestaj rimedoj, pro kio ĝi ne estas teknike perfekta. Ankaŭ la kinarta realigo de ĝia koncepto, en si mem interesa, sed tro ambicia, estas amatora kaj povas impresi komike al nuna spektanto. Temas tamen pri valora dokumento, kiu estis produktita de la multflanka movada aktivulo Joachim Giessner (1913-2003) sub la ŝildo “Esperanto-Filmo Germanujo”. Giessner transdonis la 16-milimetran bendon siatempe al UEA, kiu prizorgis la ciferecigon. Ligilo: <http://www.ipernity.com/doc/uea/12331667>. Osmo Buller. (Ret-Info, Hungario)

Hungario 2 – Nova Esperanta Retradio –

Kiu regule partoprenas en Esperanto-renkontiĝoj, tiu povus kredi, ke jam tio kondukas al bona regado de la lingvo. Kaj se tiu sama homo estas abonanto de iu periodaĵo en Esperanto, tiu kredo povas esti ankoraŭ eĉ pli granda. Tamen ambaŭ ne sufiĉas: la partopreno en unu aŭ du aranĝoj jare lasas grandajn tempajn truojn, dum kiuj oni nek aŭdas nek parolas la lingvon. Legi oni ja povas dum la tuta jaro.



Por atingi fluecon de la lingvo necesas ankaŭ regule aŭdi ĝin. Tio ja eblis dum la pasintaj jardekoj, se oni aŭskultis radioelsendojn en Esperanto. Bedaŭrinde en la epoko de la mallongondaj elsendoj la plezuro kaj lernefiko estis minimumaj. Nur kiam la elsendoj disaŭdiĝis persatelite, tio decide ŝanĝiĝis. Kaj kiam la elsendoj fariĝis ankaŭ aŭdeblaj en la interreto, oni povis aŭskulti ilin en la tuta mondo. Tamen la parolnivelo en Esperanto ne multe pliboniĝis. La kaŭzoj estis unue la enhavo de la elsendoj, kiu ofte estis propaganda, kaj due la komprenebleco. Ĝuste tiuj homoj kiuj havis la plej grandan lernbezonojn ne uzis la radioelsendojn, ĉar la parolado estis aŭ tro rapida aŭ enhavis tro da nekonataj vortoj. Do ili ne kapablis transalti tiun sojlon.

La Esperanta Retradio helpas en ambaŭ kazoj: la temaro estas laŭeble vasta kaj la programoj krome enhavas ilustraĵojn kaj filmetojn, kaj forestas ĉia propagando. Por ebligi al progresantoj transpaŝi la sojlon de kompreno, la kompleta programo estas ankaŭ legebla. Tio estas vere unika novaĵo. La viglaj reagoj de la geaŭskultantoj klare konfirmas tion, kaj do la Esperanta Retradio nun ofertas servon kiu vere povas kontribui al decida plibonigo de la parolnivelo de multaj homoj. Faru provon: adreso de la Esperanta Retradio: <http://peranto.posterous.com>.

(Retinfo, Eventoj, Hungario)

Irlando – Eŭropunia himno en Esperanto –

En aprilo la EU donis al unu miliono da civitanoj en sep diversaj landoj, la rajton rekte influi la politikon de la EU. Laŭ iniciato de Flory Witdoeck, vicprezidantino de la EEU, tiu ĉi volas proponi al la Eŭropa Parlamento, ke ĝi

rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto kun la vortoj de Umberto Broccatelli, kiam reprezentantoj de membroŝtatoj volas kune esprimi sian apartenon al komuna samrajtigita Eŭropo.

La celoj de tiu ĉi civitana iniciato estas:

- (1) helpi plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj, regionaj kaj aliaj identecoj, kaj tiel pliefikigi la EU-on por la civitanoj;
- (2) pliiigi la partoprenon de la civitanoj en la eŭropa integriĝo;
- (3) helpi atingi (1) kaj (2) per vortoj de neŭtrala, tuteŭropa lingvo por ebligi al civitanoj kanti kune;
- (4) sekurigi la samecon de respekto por ĉiuj eŭropaj lingvoj;
- (5) rekonfirmi kaj reekvilibrigi la du elementojn de la moto de la EU, “unuiĝo en diverseco”, por certigi, ke oni ne tro substreku diversecon nek maltrou uniĝon.

Tamen strikte teknike ne estas la EEU mem, kiu faras la proponon, ĉar organizaĵoj ne rajtas fari tion. Tial on kunmetis komisionon de sep gravaj esperantistoj el sep diversaj landoj, inter kiuj la ses plej grandaj, kiuj kune havas ĉirkaŭ 340 milionoj da loĝantoj. Seán Ó Riain, prezidanto de la EEU kunordigos la laboron. La plej granda laboro estos la kolektado de 1.000.000 da subskriboj.

La esperantan tekston de la tradicia eŭropa himno de la EEU (laŭ muziko de Ludwig van Beethoven), kiun verkis Umberto Broccatelli, la karmemora antaŭa prezidanto de la EEU, oni povas aŭskulti ĉe www.europo.eu/eo/euhropa-himno, kie estas tradukoj al ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de la EU, kaj pliaj al la kroata, kaj al pluraj regionaj, malplimultaj lingvoj kaj monda lingvoj (la ĉina, araba, rusa, japana, hindia, bengala, indonezia). Aliaj tradukoj bonvenas, sed jam havi 39 tradukojn el tiom da landoj certe impresos la ne-esperantistojn.

Ni esperu sukceson! Sed eĉ pli grave: ni laboru por sukceso! (Seán Ó Riain, Irlando)

Deviga steriligado de la virinoj (Verplichte sterilisatie van de vrouwen)

La prezidento de Uzbekio, Karimov, devigas la kuracistojn fortranĉi la uteron de la virinoj, sen ke tiuj ĉi scias aŭ akceptas tion, por limigi la nombron de la naskiĝoj. Tiu malnobla kaj kruela krimo kontraŭ la virinoj estas organizata de unu el la plej malbonaj diktatoroj de nia planedo. Aktivuloj de la Homaj Rajtoj opinias, ke dekmiloj kaj eĉ centmiloj da virinoj jam



estis sekrete steriligitaj dum rutina vizito al aŭ akuŝo en malsanulejo.

Karimov eĉ kondamnis al morto oponentojn kaj ĵetigis ilin en bolantan akvon. Malgraŭ siaj krimoj, la usona registaro subtenas lin per milionoj da dolaroj, por ke ĝiaj militistoj povu resti en la lando. Tiu lasta ondo de liaj krimoj kontraŭ la virinoj de lia lando instigis la amas-komunikilojn en la tuta mondo raporti pri la fifaradon de tiu monstro. Ni alvoku la usona ŝtatssekretariino Hillary Clinton, kiu cetere fervore defendas la virinajn rajtojn, tuj ĉesigi tiun subtenon al la uzebeka prezidento. Ŝi jam publike kondamnis Karimov pro perfortado de la homaj rajtoj, sed tio nur pligravigis liajn atencojn kontraŭ la virinoj.

Tial subskribu la peticion alvokantan Clinton fari finon al la terora regado de Karimov kaj stopi tiujn krimojn: https://secure.avaaz.org/fr/uzbekistan_sterilisation_fr?vl.

(*Jeanne Draime, Belgio*)

La Usona Interna Milito (2)

(De Amerikanske Burgeroorlog) (2)

La plej multaj loĝantoj de Kentukio favoris la Union, sed ne la guberniestro. Li rifuzis sendi trupojn al Vaŝingtono kaj deklaris sian ŝtaton neŭtrala. Tiam la juna kapitano Nathaniel Lyon, alvenis en Saint-Louis en Misurio, kie kunfluas la riveroj Misisipo kaj Misuro. La ŝtato Misurio limtuŝas Ilinojson, Kentukion kaj Teneseon. En Saint-Louis li konatiĝis kun iu Francis Blair, kies frato laboris en la kabineto de Lincoln. En Saint-Louis troviĝis granda arma arsenalo kun 60.000 muskedoj, 1.500.000 kartoĉoj, dekduoj da kanonoj kaj maŝinoj por fari armilojn. La guberniestro de Misurio, Jackson, volis akiri tiun arsenalon por

la Sudo. Danke al la influo de Blair, Lyon ricevis la komandon de la arsenalo. Krome li ricevis la pmeson armi 10.000 virojn por protekti ĝin. Per ili li okupaciis porsecesian armeon tendaron kaj arestis ĝian milicion.

Multaj loĝantoj de Saint-Louis, kiuj favoris la secesion, ne akceptis tion, kaj vera milito eksplodis en stratoj de la urbo. Por preventi sangoverŝadon generalo Sterling Price, komandanto de la misuriaj trupoj, intervenis kaj sukcesis fari pacon inter la secesiistoj kaj la uniistoj.

Sed ankaŭ Price simpatiis kun la Sudo. Tial Blair denove skribis al sia frato en Vaŝingtono. La sekvo estis, ke Lyon estis promociita al brigada generalo. Jackson kaj Price rifuzis akcepti tion, kaj Jackson kolektis milicion. Tial Lyon marŝis al la ĉefurbo de Misurio kun sia armeo. Jackson estis venkita, kaj Price fuĝis suden. Meze de junio la ŝtato Misurio estis en la federaj manoj.

Kentukio havis ŝtatan gvardion, komandatan de generalo Simon Buckner. Ĉirkaŭ 1855 tiu ĉi renkontis en Nov-Jorko samklasanon de West Point, ekskapitano Ulysses S. Grant. En 1854 Grant estis forsendita de la armeo pro alkoholismo kaj malobeo. Ĉar li ne sukcesis trovi konvenan laboron, li decidis revojaĝi al sia hejmlando Ohio. Sed li ne havis monon, kaj tial petis Buckner doni al li la necesan sumon. Buckner, kiu kompatis sian malnovan kamaradon, faris tion. Komence de la interna milito Grant denove ekservis en la armeo. Li finis sian karieron kiel 18-a prezidento de Usono!

Sed ankaŭ generalo Buckner simpatiis kun la Sudo kaj do ne estis fidinda. Tial alia porunia hejmgvardio estis organizita en Kentukio. Kiam porsklavecaj kentukianoj protestis kontraŭ tiu rompo de la neŭtraleco, Lincoln sendis generalon kun armeon trans la riveron Ohio. Tiu aranĝo sufiĉis por teni Kentukion en la Unio.

Intertempe Vaŝingtono provis faris unuecan armeon el la diversaj regimentoj. La maljuna leŭtenanto-generalo Winfield Scott, ĉefkomandanto de la usona armeo, konfidis tiun laboron al brigada generalo MacDowell

Ties tasko estis malfacila: li devis transformi la regimentojn en brigadoj kaj divizioj, trejni la trupojn kaj instrui al ili disciplinon. Sed li ne havis adekvatan stabon de oficiroj por asisti lin, kaj la Militista Departemento montriĝis nekapabla ĝustatempe liveri uniformojn kaj armilojn.

Je ĉirkaŭ 40 km sudokcidenten de Vaŝingtono tendumis suda armeo apud Manassas en



La 32 ŝtatoj de Usono ĉirkaŭ 1860. Bluaj estas la nordaj ŝtatoj, brunaj estas la sudaj kaj verdaj la t.n. limŝtatoj.

| | | | | |
|---------------|----------------|----------------|---------------------|--------------------|
| ALA = Alabamo | IND = Indiano | KY = Kentukio | MISS = Misisipio | SK = Suda Karolino |
| GA = Georgio | IOWA = Iovo | LA = Luiziano | MO = Misurio | TEXAS = Teksaso |
| ILL = Iliojso | KANS = Kansaso | MD = Marilando | NC = Norda Karolino | VA = Virĝinio |

Virĝinio, kaj la loĝantaro de Vaŝingtono postulis, ke MacDowell tuj ekmarŝu kontraŭ tiun armeon. 10.000 sudaj soldatoj postenis sur la montetoj malantaŭ roĝo nomata Bull Run. La 16-an de julio MacDowell atakis ilin kun 35.000 apenaŭ trejnitaĵoj. Ĉe la unua kontraŭatako de la suduloj la plimulto de la nordaj trupoj forkuris. Multaj nordaj civiluloj, kiu volis vidi, kiel la suduloj estas disbatitaj, kuris por savi sian vivon.

En Ohio la brila juna norda generalo George MacClellan komandis ĉiujn trupojn laŭlonge de la rivero Ohio. Li unuigis la 27 regimontojn de Ohio kaj Indiano, montrante sin bona organizanto, administranto kaj gvidanto. En junio li venkis konfederan armeon en okcidenta Virĝinio, kie li kreis novan ŝtaton inter la montoj Alengenoj kaj la rivero Ohio: la ŝtato Okcidenta Virĝinio.

Ĉefkomandanto Scott proponis sian militplanon al Lincoln, kiu aprobis ĝin. Tiu plano, la "Anakondaplano", celis encirkligi kaj stranguli la Sudon. Forta armeo estis sekvonta la riveron Misisipo ĝis Nov-Orleano por enfermi la Sudon en la Okcidento, dum ŝipoj estis blokantaj ĉiujn sudajn oceanhavenojn. Dume armeo estis sendota en Virĝinion por kapti Richmond, la sudan ĉefurbon. Jam la 4-an de julio Lincoln ordonis la blokadon de la sudaj havenoj, tiel ke la suduloj ne plu povis eksporti kotonon kaj tabakon.

En la sudo de Misurio la forpelita guberniestro Jackson intencis liberigi sian ŝtaton de la norduloj per armeo de 50.000 misurianoj. La 10-an de aŭgusto Lyon atakis la secesiistojn, sed malgraŭ la kuraĝo de siaj soldatoj, Lyon estis venkita kaj li mem mortigita.

La du plej elstaraj nordaj generaloj de la momento estis MacClellan kaj Frémont. Post la malvenko apud Bull Run MacClellan ricevis la komandon de ĉiuj trupoj en kaj ĉirkaŭ la usona ĉefurbo Vaŝingtono. Li tuj komencis krei veran armeon, kiun li nomis "la Potomaka Armeo" laŭ la nomo de la rivero Potomako, kiu estas la limo inter Marilando kaj Virĝinio.

Majoro-generalo John Frémont ricevis la taskon savi la limŝtatojn en la Okcidento kaj konkeri la tutan valon de Misisipo por la Unio. Li vojaĝis al Saint-Louis, kiam la secesiistoj volis repreni Iliojson, Misurion kaj Kentukion. Ili havis armeon de 50.000 viroj, kiu minacis Cairo en suda Iliojso apud la kunfluejo de la riveroj Ohio kaj Misisipo.

Generalo John Frémont marŝis al Cairo kun 40.000 soldatoj, sed la secesiistoj retiriĝis. Hazarde Grant servis en lia armeo kiel kolonelo de la 21-a Iliojsa Infanteria Regimento. Lia tasko estis teni la fervojojn en orienta Misurio. Frémont donis al li la komandon de la militista distrikto Sud-Orienta Misurio, kies komandejo troviĝis en Cairo, kaj la rangon de brigada generalo.



Prezidento Abraham Lincoln (1809-1865)

Grant tuj demetis sian uniformon de kolonelo, kaj vestita kiel civilulo, li iris al la oficejo de la tiama komandanto, skribis ordonon, per kiu li malfunkciigis lin kaj prenis la komandon sur sin. La komandanto dubis kaj volis aresti Grant kiel trompiston, sed finfine li akceptis, kaj Grant tuj aktiviĝis en la regiono.

Trans la rivero situas la ŝtato Teneseo, en kies nord-okcidenta angulo troviĝis konfederala armeo kun majoro-generalo Polk. En septembro Polk okupaciis Columbus, urbeton en suda Kentukio. Tiu urbeto situis sur altaĵo ĉe Misisipo kaj estis la terminalo de suda fervojo. Grant tuj reagis okupaciante Paducah apud Columbus. Tiam li reiris al Cairo, lasante Padukah al generalo William Sherman kun 2.000 apenaŭ trejnita kentukianoj. La suda registaro reagis sendante generalon Albert Johnston kiel komandanton de la Okcidento kun granda bone trejnita kaj ekipita armeo. Kun 3.000 soldatoj Grant malsupreniris perŝipe la riveron Misisipo.

En oktobro MacClellan sendis parton de sia armeo trans Potomakon. Malfeliĉe tiu armeo trafis sur pli fortajn konfederaciajn trupojn. La federuloj estis venkitaj, lasante 900 mortigojn sur la batalkampo. Tiam McClellan mem estis sendita al Virĝinio kun granda armeo kaj la tasko konkeri Richmond. Li

enfosis sin sur favora loko kaj decidis atendi bonan momenton por ataki, sed faris nenion. Lia persona skoltisto Pinkerton certigis lin, ke la suda generalo Joe Johnston havas grandegan kaj agreseman armeon. Sed verfakte lia propra armeo estis duoble pli granda ol tiu de Johnston. La prezidento urĝis lin fari ian agresan movon antaŭ la vintro, sed li rifuzis. Li ĉiam bezonis du aŭ tri pliajn semajnojn, antaŭ ol povi startigi militiron. Aliflanke ankaŭ la suda armeo ne moviĝis.

En novembro la maljuna Winfield Scott demisiis kiel ĉefkomandanto de la armeo, kaj MacClellan sukcedis lin, dum li restis komandanto de la Potomaka Armeo.

(Laŭ Bruce Catton - daŭrigota)

Nia rakonto: La Muŝo (1)

(Ons verhaal: De Vlieg) (1)

“Vi estas tre komforta ĉi-ene,” diris la maljuna sinjoro Woodifield, sidante en leda brakseĝo flanke de la skribtablo de sia amiko kaj mastro kaj rigardante lin kiel bebo el ĝia ĉareto.

La konversacio finiĝis, kaj la tempo urĝis por li foriri hejmen. Sed li ne deziris jam foriri. Ekde kiam li retiriĝis, ekde lia apopleksio, lia edzino kaj liaj filinoj tenis lin enfermita en la domo ĉiun tagon de la semajno escepte de marde. Marde li estis vestita kaj broŝita kaj permesita iri al la urbo por la tuta tago, kvankam la edzino kaj la knabinoj ne povis imagi, kion li faras tie. Eble, ili supozis, li tie enuigas siajn amikojn, ...

Nu, eble jes. Kiel ajn, Woodifield alkroĉiĝis al siaj lastaj plezuroj, kiel arbo al siaj lastaj folioj. Tial la maljuna Woodifield sidis tie, fumante cigaron kaj fikse kaj preskaŭ avide rigardante la mastron, kiu sidiĝis en sia oficeja seĝo, korpulenta, rozkolora, kvin jarojn pli aĝa ol li, sed ankoraŭ forta, ankoraŭ ĉiam tenante la rudron. Estis plezuro vidi lin.

Nostalgie, admirante la maljuna voĉo ripetis:

“Jes, estas komforte ĉi-ene, je mia honoro!”

“Jes, estas sufiĉe komforte ĉi tie,” konsentis la mastro, frapetante per sia papertranĉilo sur la *Financial Times*. Li efektive estis fiera pri sia oficejo. Li ŝatis, ke ĝi estas admirata, precipe de la maljuna Woodifield. Sidi en ĝia mezo en la plena vido de tiu maljuna, fragila figuro en sia ŝalo donis al li senton de profunda kontenteco.

“Mi renovigis ĝin antaŭ nelonge,” li klarigis, kiel li jam klarigis dum la pasintaj semajnoj tiom da fojoj. “Nova tapiŝo,” li diris, montrante

la brilan, ruĝan planktapiŝon kun ŝablono de grandaj, blankaj ringoj. “Novaj mebloj,” li daŭrigis, kapjesante al la masivaj libroŝranko kaj tablo kun kruroj kiel tordita melaso. “Elektra hejtilo!” Preskaŭ jubilante li svingis manon al la kvin travideblaj, perlantaj saŭcoj, kiuj dolĉe boletis en siaj kupraj potoj.

Sed li ne atentigis la maljunan Woodifield pri la fotografio sur la tablo de serioze rigardanta junulo en militista uniformo, staranta en unu el tiaj fotografaj parkoj kun fotografaj ŝtormnuboj malantaŭ li. Ĝi ne estis nova. Ĝi staris tie jam pli ol ses jarojn.

“Estis io, kion mi deziris diri al vi,” diris la maljuna Woodifield, kaj liaj okuloj fariĝis nebuletaj, dum li provis rememori ion. “Sed kio estis tio? Mi havis ĝin en mia kapo, kiam mi foriris ĉi-matene de ĉe mi, kaj nun mi forgesis, kio estas.” Liaj manoj ektemis kaj ruĝaj makuloj montriĝis super lia barbo.

Povra maljunulo, li iras per siaj lastaj kruroj, pensis la mastro. Kaj sentante sin afabla, li mansvingis al la maljunulo kaj diris ŝercante:

“Mi diras al vi. Mi havas ĉi tie altvaloran trinkaĵon, kiu faros al vi bonon, antaŭ ol vi denove eliros en la mavarmon. Estas io tre bongusta. Ĝi ne damaĝus infanon.”

Li prenis ŝlosilon de sia horloĝoĉeno, malŝlisis ŝranketon sub lia skribtablo kaj eligis malhelan dikan boteleton.

“Tio estas bona kuracilo,” li diris. “Kaj la viro de kiu mi aĉetis ĝin, certigis al mi, ke ĝi venis el la keloj de la kastelo Windsor.”

Vidante ĝin, la maljuna Woodifield malfermiĝis la buŝo pro miro. Li ne povus esti pli surprizita, se la mastro estus montrinta blankan kuniklon.

“Tio estas viskio, ĉu ne?” li demandis mallaŭte.

La mastro turnis al li la botelon kaj afable montris al li la etikedon. Viskio tio estis.

“Ĉu vi scias,” li diris, rigardante la mastron kun admiro, “ke hejme oni ne lasas min tuŝi ĝin?” Kaj li rigardis, kvazaŭ li estus ploronta.

“Ha, pri tio ĉi ni scias iom pli ol la damoj,” kriis la mastro, iris al la tablo, sur kiu staris du glasetoj kun botelo da akvo, kaj verŝis grandaniman kvanton de la trinkaĵo en ĉiun el ili.

“Trinku. Tio faros al vi bonon. Kaj ne verŝu akvon en ĝin. Estus sakrilegio fuŝi tiel bonan trinkaĵon kia tiu ĉi.”

Li trinkis bonan gluton.

“Ha! Kiel bongusta tio estas!” li diris, prenis la glason de sia buŝo, tiris buntan naztukon el sia poŝo kaj haste viŝis al si la liparojn, dum li

okulumis al Woodifield, kiu siavice metis la glaseton ĉe la buŝon, glutis, silentis momenton kaj tiam diris mallaŭte:

“Tio havas fortan guston.”

Sed la viskio varmigis lin, rampis en lian maljunan, malvarman cerbon, kaj li subite rememoris, kion li intencis rakonti.

“Nun mi scias, kion mi volis rakonti al vi,” li diris, ekstarante el sia seĝo. “Mi pensas, ke vi ŝatas aŭdi tion. La pasintan semajnon miaj knabinoj estis en Belgio por viziti la tombon de mia povra Reggie, kaj hazarde ili trafis antaŭ la tombon de vi filo. Ŝajnas, ke ili kuŝas unu tre proksime de la alia.”

Woodifield paŭzis, sed la mastro respondis nenion. Nur tremeto en liaj palpebroj montris, ke li aŭdis ĉion, kaj ke li pretis plu aŭskulti.

(Katherine Mansfield; daŭrigota)

AKTIVAĴOJ DE LA LIMBURGA ESPERANTO-ASOCIO

En marto kaj aprilo 2012:

Ĵaŭdon, la 29-an de marto 2012

Kvin membroj partoprenis en la vortludo gvidata de Henri Schutters. Por unu ĝuste divenita litero la partoprenantoj ricevis unu poenton. La unuan partion gajnis An Olij-slayers, la duan Jan Doumen. Sed la gajninto de la vespero restis An. Gratulon!

Ĵaŭdon, la 26-an de aprilo 2012

Ses membroj partoprenis en la kantado de esperantaj kantoj. Jan Doumen gvidis la kantadon, kiun Paul Hotterbeekx akompanis per sia gitaro. Antaŭ ol kanti iun kanton, oni legis kaj tradukis la tekston. Fine de la vespero Paul kantis tri modernajn popularajn esperantigitajn kantojn, akompanante sin per sia gitaro. Ĉiuj ĝuis la kantadon.

En majo kaj julio 2012:

Ĵaŭdon, la 31-an de majo 2012

Ĉiuj (eks-)membroj de LEA estas invitataj partopreni en la kartluda vespero. Horo kaj loko: je la 8-a vespere en la Poorthuis, Zuidervest 2A, Peer.

Ĵaŭdon, la 28-an de junio 2012:

Paul Hotterbeekx gvidos promenadon ĉirkaŭ la fama Tomp de Achel. Ni kolektiĝos ĉe la domo de Paul, Hamonterweg 69, B2, Achel. Rendezuo je 19h45.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Dua Libro de l’ Lingvo Internacia (6) (*D-ro L.L. Zamenhof*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Francio: Kontraŭ la unika penso (*Henri Masson, Francio*)
- Slovenio: Esperantisto ministro en Slovenio (*Libera Folio*)
- Brazilo: Post Ĝangalo... Nunonia (*Ret-Info, Hungario*)
- Usono 1: Google tradukas en Esperanton (*Amri Wandel, Israelo*)
- Paĝo 5: - Usono 2: La multaj vivoj de D-ro Esperanto (*Henri Masson, France*)
- Hungario 1: Filmo en la Reta Kinejo de UEA (*Ret-Info, Hungario*)
- Hungario 2: Nova Esperanta Retradio (*Ret-Info, Hungario*)
- Paĝo 6: - Irlando 2: Eŭropunia himno en Esperanto (*Seán O Riain, Irlando*)
Deviga steriligado de la virinoj en Uzebekio (*Jeanne Draime, Belgio*)
- Paĝo 7: La Usona Interna Milito (2) (*Laŭ libro de Bruce Catton, Usono*)
- Paĝo 9: Nia rakonto: La Muŝo (*Katherine Mansfield*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio.

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lango, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj?
La mondo bezonas supranacian, duan lingvon.
Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj.
“Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V.
Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton.
Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar?
De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig.
Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatiek heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren.
“Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V.
Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto.
Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples.
"Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint.
Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.